

La suba teksto troviĝis la 20-an de novembro de 2014 en  
[http://miresperanto.com/personajhoj/text/Kion\\_instruas\\_la\\_Sekreta\\_Doktrino.htm](http://miresperanto.com/personajhoj/text/Kion_instruas_la_Sekreta_Doktrino.htm)

Mi nur enmetis la esperantajn supersignojn (Herbert A. Welker).

## **Kion instruas la Sekreta Doktrino**

Mallonge pri Je.P.Blavatskaja (1831-1891). Naskiĝinte en nobela rusa familio, ĝi ekde infaneco posedis neordinarajn psikajn kapablojn, similajn al tiuj de Kaliostro, Jakov Boeme aŭ Svedenborg. En 17-jara aĝo ĝi estis edzinigita al maljuna generalo, sed baldaŭ forkuris de li kaj komencis vojaĝi tra la mondo. Ŝi vizitis Egipton, Turkion, Anglion (tie ĝi renkontis sian Guruon, antaŭe viditan en sonĝoj), Hindion, Ĉinion, Japanion, ambaŭ Amerikojn k.a. En 1864 ĝi finfine atingas sian celon -Tibeton, kie dum 8 jaroj lernas ezoteran sciencan sub senpera gvidado de la Grandaj instruistoj - Mahatmoj. Kiam ĝi revenis en Europon, ĝi jam posedis neelĉerpeblajn sciojn kaj unikan magian potencon. En 1875-a jaro em Nov-Jorko Blavatskaja fondis Teozofan Societon. En 1878-a jaro la Societo translokiĝis en Hindion, sed tiea klimato malbone efikis la sanon de Jelena Petrovna. Lastajn jarojn ĝi vivis en Londono, verkante multajn librojn kaj artikolojn. (Tiam okazis dramaj eventoj por Blavatskaja kaj ĝia afero. Jezuitoj subaĉetis ĝiajn servistojn en Hindio, kaj tiuj deklaris ĝin ĉarlatanino. Oni inspiris grandiozan kalumnian kampanjon kontraŭ Blavatskaja kaj ĝiaj amikoj, kio multe malhelpis al disvastiĝo de Teozofio.)

"Sekreta Doktrino" (subtitolo: "Sintezo de scienco, religio kaj filozofio") estis ĉefa verko de Je.P.Blavatskaja. Laŭ amplekso ĝi superas Bibliion kaj konsistas el du ĉefaj partoj: "Kosmogenezis" kaj "Antropogenezis", kiuj siavice dividiĝas je diverstemaj ĉapitroj. La verkego komenciĝas per prahistoria manuskripto "Stancoj Dzia", kiuj simbole traktas naskiĝon kaj evoluon de Universo, formiĝon de la Suna sistemo kaj historion de unuaj homaj rasoj; pluj centoj da paĝoj detale klarigas kaj komentas la "Stancojn". Ĉio en Kosmo pulsas, alterne aktivas kaj "ripozas". Post ĉiu Pralajo - periodo de neekzisto de Universo - komenciĝas nova Manvantaro - tago de la Kosmo, kiam Logos (Dio) kun siaj servantoj - Planedaj spiritoj, Kreantoj de mondoj - komencas krei la materion, stelojn, planedojn. Ĉio en Universo evoluas, perfektigante. Planedoj, same kiel homoj, vivas kaj mortas, transdonante sian energion al alia planedo. Vivo sur Tero devenas de Luno: niaj animaloj estis vegetajhoj sur Luno, vegetajhoj estis mineraloj. Kiam nia planedo finos sian evoluon, ĝia vivo akiros novajn formojn sur alia planedo: niaj animaloj fariĝos homoj, sed homoj fariĝos Anĝeloj...

Unuaj homoj sur Tero estis eterecaj, kvazaŭ fantomoj, kaj ne posedis racion; ili estis senseksaj kaj nemortemaj. Post multaj milionoj da jaroj ilin anstataŭis dua, pli materia raso - ĝi estis ambaŭseksa (hermafrodita) kaj naskadis per ovoj. Nur en tria raso homoj akiris tute fizikan korpon kaj dividiĝis je viroj kaj virinoj. Unuaj rasoj estis tre altkreskaj, sed poiome malplialtiĝis. Tamen eĉ homoj de tria raso, Lemuroj, estis altaj je pluraj metroj ("Gigantoj estis sur la tero en tiu tempo" Genezo, 6 - 4). Pri iliaj dimensioj donas imagon la famaj statuoj de la insulo de Pasko - la sola restinta parto de Lemurio, pereinta antaŭ 4 000 000 jaroj. Vanaj estas ĉiuj provoj de arkeologoj elfosi ligan "ĉeneron" inter simioj kaj homo. Ne homo devenas de simio, sed, kontraŭe, simio devenas de homo. Simioj (antropoidoj) naskiĝis, kiam fruaj homoj, havintaj alian anatomion ol ni, pariĝis kun diversaj animaloj. Tiam naskiĝis ankoraŭ multaj monstraj hibridoj, kiuj poste formortis.

Ne ĉiam la kontinentoj estis samaj, kiel nun. Tero periode renovigas sian "haŭton". Kiam vica raso finas sian evoluon, tiam ĝia kontinento pereas kaj el sub akvoj leviĝas nova kontinento, kie loĝos sekvanta raso. Kvara raso estis Atlantoj. Atlantido havis tre altan civilizon: ĝi pereis antaŭ 850 000 jaroj (ĝia lasta parto - insulo Posejdonis dronis antaŭ nur 12 000 jaroj): iom pli frue komenciĝis historio de nia kvina, blanka raso. Entute estos 7 rasoj. Homoj de sesa raso estos

similaj al Budho kaj Kristo, t.e. jam duondioj. Lasta raso estos neimageble perfekta: homoj de sepa raso estos lumantaj kaj flugantaj, ĉionsciaj kaj ĉionpovaj...

La "Sekreta Doktrino" same kontraŭas nunan sciencon: astronomion, fizikon, biologion, historion - kiel tiuj ĉi sciencoj kontraŭas la dogman religion; sed novaj malkovroj de sciencistoj nepre konfirmos ĉion en ĝi skribitan...

(31.03.99)

N.G.